

Akurateco en la informado pri kongresoj, rezolucio de la UK en Helsinki,
praktikismo kaj idealismo

Claude Gacond, 316-a radioprelego, 1969.10.29 & 11.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi someron ni plian fojon konstatis, ke ekzistas granda malfacilaĵo esti akurate informita pri la esperantistaj manifestacioj. Eĉ pri la Universala Kongreso la informa servo ne kapablis liveri freŝajn novaĵojn, kiuj estus permesintaj redakti radio-kronikojn aŭ gazet-artikolojn. Ni ne forgesu, ke radioj kaj gazetoj emas raporti pri aktualaĵoj. Se la novaĵoj datas de du semajnoj, ili perdis sian valoron profite al pli freŝaj novaĵoj.

A.- Ĉiu lando havas sian novaĵ-agentojn, kies rolo estas diskonigi al gazet-eldonejoj kaj radio-dissendejoj la aktualaĵojn. Bedaŭrinde Esperantio ne ankoraŭ kapablis starigi similan agentejon je la profito de siaj ĵurnalistoj kaj radio-kronikistoj. Estas granda manko, kiu estas unu el la kaŭzoj de la stagneco de la esperanto-movado.

Cl.- Por ni esperantistoj la somero estas la sezono de la kongresoj. Kaj ĉiu deziras esti rapide informita pri la sukceso kaj programoj de la plej diversaj kongresoj. Bedaŭrinde ni ĝenerale devas atendi ĝis meze de septembro por ekhavi superrigardon pri la someraj manifestacioj. Tiam ni konservas tiujn novaĵojn por ni mem kaj rezignas ekzemple verki artikolojn por la nacilingvaj gazetoj.

A.- Plian jaron la ne-esperantista publiko ne estos informita pri niaj kongresoj. Pro tio tiu publiko iom post iom eĉ forgesas pri la ekzisto mem de nia lingvo. Jen pli kaj pli netolerebla situacio.

Cl.- Persone ni neniam havis la okazon partopreni Universalan Kongreson de UEA. Ni do povas paroli pri tiu manifestacio nur kiel eksteruloj, kiujn informas la oficialaj raportoj unuparte kaj la individuaj raportoj de kongresanoj aliparte.

A.- Ŝajnas al ni, ke la temoj de tiuj kongresoj estas tro ĝeneralaj. Estas facile konstati, ke en la mondo ne ĉio iras glate kaj kontentige kaj en belaj rezolucioj proponi esperanton al la registaroj. El la ĉijara rezolucio de la Universala Kongreso ni legas la proponojn :

Cl.- « *La 54-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Helsinki de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1969 en la ĉeestoj de 1900 reprezentantoj el 38 landoj, diskutinte la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj proponas al la registaroj de ĉiuj ŝtatoj :*

Unue : Objektive konsideri la nemezureblajn, ĝis nun nespertitajn praktikajn utilojn, kaj la grandegajn moralajn-politikajn, ekonomiajn, psikologiajn kaj aliajn avantaĝojn, kiujn prezentas por ĉiu individuo, ĉiu nacio kaj la homaro kiel tuto, la akcepto de la Internacia Lingvo (Esperanto) kiel neŭtrala instrumento de komunikado por ĉiuj oficialaj kaj neoficialaj internaciaj rilatoj.

Due : Entrepreni la necesajn paŝojn por plirapidigi per adekvataj metodoj la procezon de ĝeneraliĝo de la uzo de la Internacia Lingvo en mondaj kadroj precipe per vastigo de ĝia instruado en la lernejoj. »

A.- Belaj frazoj, ĉu ne ? Sed ĉu vere vi pensas, ke unu sola registaro en la mondo atentis pri ili ? Kaj se oni iom atente ekzamenas ilin, oni eĉ malkovras specon de mensogo. Ĉu vere ni rajtas diri en tia rezolucio :

C.- « *...en la ĉeesto de 1900 reprezentantoj el 38 landoj... »*

A.- Jure reprezentantoj ne estas homoj, kiuj mem aliĝas al kongreso, mem pagas ĉion : la vojaĝo, kongres-kotizo kaj hotel-kostoj. Reprezentantoj estas delegitoj de societoj. Alia mensogeto :

Akurateco en la informado pri kongresoj, rezolucio de la UK en Helsinki,
praktikismo kaj idealismo

Claude Gacond, 316-a radioprelego, 1969.10.29 & 11.01

Cl.- « ...diskutinte la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj... »

A.- Ĉu 1900 kongresanoj, kiuj renkontiĝas nur unu semajnon por ĉefe turisme viziti urbon, ĉeesti teatrajn, folkloran kaj distrajn spektaklojn, kaj amatore partopreni iom improvizitan debaton kaj fest-paroladojn, vere havas la tempon kaj eĉ la deziron diskuti la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj ?

Cl.- Ni devus havi la kuraĝon vidi la realecon, kiel ĝi estas. En Helsinki kongresis 1900 esperantistoj, kaj ili simple proponas al la registaroj sian internacian lingvon. Ili tute ne havis la tempon diskuti pri la aktuala monda lingva situacio, ili ĉefe amuziĝis.

A.- Kaj dum ili amuziĝis, delegitoj de la naciaj kaj fakaj societoj kunsidis por diskuti pri la problemoj internaj al UEA kaj al la esperanto-movado.

Cl.- Jen la realaĵo.

A.- Ni ne malaltigas la gravecon de la Universala Kongreso, sed ni ŝatus, ke la esperantistoj perdu la iluzion, ke la registaroj ilin aŭskultas. Anstataŭ diskuti pri ĝeneralajoj, ili ekzamenus siajn proprajn problemojn kaj provu ilin solvi.

Cl.- Tiurilate en Helsinki okazis io nova. Malfermo de Debato. Post tro longaj enkondukaj paroladoj de sinjorino Emilija Lapenna kaj sinjoro E. L. M. Wensing la partoprenantoj povis esprimi sian opinion pri la esperanto-movado. Kiel ni havis la okazon aŭdi per individuaj raportoj, kaj poste informiĝi per oficiala raporto en la UEA-organo *Esperanto*, la opinioj dividiĝis sufiĉe egale inter du tendencoj, kiujn ni difinos per la vortoj **praktikismo** kaj **idealismo**.

A.- Tiuj Debatoj povus lumigi la problemojn, kiuj ekzistas en la esperanto-movado, la dezirojn de la esperantistoj. Ni esperas, ke en la venontaj Universalaj Kongresoj novaj Debatoj pri precizaj temoj estos organizataj. En ili devus povi kunsidi veraj delegitoj de la diversaj naciaj kaj fakaj societoj, kaj la aliaj kongresanoj devus esti invitataj formi aŭdantaron. Tiel naskiĝus speco de Parlamento, kaj tiel ni rajtus paroli pri veraj reprezentantoj. Anstataŭ perdi tempon per enkondukaj paroladoj, tiuj enkondukaj tekstoj devus aperi en dokumento, kiun ricevus la diversaj esperantistaj societoj almenaŭ ses monatojn antaŭ la Debato. Tiel en ĉiuj societoj oni povus jam antaŭe debati pri tiuj temoj, kaj la reprezentantoj ne plu reprezentus sian personan opinion, sed la opinion de la societo, kiun ili reprezentas.

Cl.- Oni devus antaŭdecidi, ke en tiuj debataj kunsidoj, decidoj ne povos okazi. Sed la protokolo de tiuj manifestacioj devus esti poste dissendata al la societoj, kiuj sendis reprezentanton kaj al la esperantistoj, kiuj ĝin aĉetas. Tiu raporto povus fariĝi grava dokumento.

A.- Tiu dokumento respiegulus la tendencojn, kiuj ekzistas en la esperantistaro kaj alportus proponojn, kiujn poste la gvid-instancoj de la esperantistaj societoj povus detalege ekzameni.

Cl.- Pri la du tendencoj **praktikismo** kaj **idealismo** ni havos la okazon reparoli la venontan semajnon. Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-